


KATALUNA ESPERANTISTO



OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO - ASOCIO

numero 261 (28) - kvina epoko - aprilo 1989



PERPINYÀ

24a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO

LEGU INFORMILON SUR PAGO
TRIA KAJ TUJ ALIGU AL
NIA KONGRESO.



* IGUALADA RENASKIĜAS POR NIA MOVADO. KUNLABORU
PER VIA PARTOPRENO EN LA KVINA INTERGRUPA REN-
KONTIĜO (legu programon sur paĝo 3a)

* KIE KONGRESI? KIAL NE BICIKLI POR KONGRESI?
(Informojn legu sur paĝo 4a)

FONDAĴOJ

ASOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO / KATALUNA ESPERANTO - ASOCIO

(Enregistrita de la "Generalitat de Catalunya" en la unua Sekcio per n-ro 5785)
Apartat /Poŝtkesto, 290 - 08200 SabadellCatalunya/Katalunio. Telefonnumero (93) 716.3633 (ekde lundo ĝis vendredo inter 20a kaj 22a h.) Kolektiva membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kunlaborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

KOTIZOJ POR LA JARO 1989 : Individua Abonanta Membro 1600 p-toj; Individua Subtenanta Membro 3200 p-toj; Individua Dumviva Membro 32000 p-toj; Kolektiva Membro 3200 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - Agència 461 - Sabadell-kontonumero 550 - 53.

PLENUMKOMITATO DE KEA : Prezidanto : Jordi Carbonell i Pinyol; Vicprezidanto : Maria Garcés i Coll; Ĝenerala Sekretario : Llibert Puig i Gandia; Kasisto: Óscar Puig i Cánovas; Komitatanoj : Carles Berga, Bartomeu Costa, Josep Franquesa, Joan R. Guiñón; Ĝirona Espero, Daniel Rubió, Josep M. Serrano.

KONTROLA KOMISIONO : Tomàs Alberich, Lluís Armadans, Ricard Jordana.

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ:

Gabriel Mora i Arana (prezidanto), Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy Brian Carr (Florluda Majstro), Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (Florluda Majstro), Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Aúriz, Abel Montagut i Masip, Giorgio Silfer (Florluda Majstro), Joan Ramon Guiñón i Roset (sekretario)

FLORLUDAJ MAJSTROJ : Clarence BICKNELL (3 aj IFL, Olot 1913), Artur DOMENECH i MAS (6aj IFL, Reus 1916), Marian SOLA i MONTSERRAT (6aj IFL, Reus 1916), Josep VENTURA i FREIXAS (8aj IFL, Girona 1921), Jaume GRAU i CASAS (9aj IFL, Manresa 1923), Bernard GOLDEN (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980), Giorgio SILFER (24 aj IFL, Olot 1984)

PEDAGOGIA KOMISIONO : Lluís de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Josep Tordera, Manel Marqués.

VORTARA KOMISIONO : Jordi Carbonell i Pinyol - Avda. del Paral·lel, 96 - 6è - Tel. 329.2481 - 241.9411, 08015 Barcelona.

KOLEKTIVAJ MEMBROJ : Centre d'Esperanto Sabadell, Apartat, 407, Papa Pius XI., 130 - tl. (93) 716.3633, 08200 Sabadell; Centre d'Estudis de la Biblioteca - Museu Balaguer/ Esperanto Grupo, St. Gervasi, 45, 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Centre Excursionista Pulgcastellar/ Esperanto - Grupo, St. Josep, 20 - 08922 Sta. Coloma 08922 Sta. Coloma de Gramenet (Barcelonès); Club d'Amics de la Unesco de Catalunya / Departament d'Esperanto, Mallorca, 207 - pral. tel. (93) 253.9507, 08036 Barcelona; Esperanto-Fako "S.C. Joventut Terrassenca", St. Francesc, 52 08221 Terrassa; Esperanto Grupo "Jozefo Anglés", Apartat, 336 - 08190 Sant Cugat del Vallès; Firma Tero Esperanto - Fako Centre Comarcal Lleidatà, Gran Via, 592 08007 Barcelona; Grup Esperantista Sant Pau d'Ordal, Dr. Zamenhof, 12 tel. 899.3003 - 08739 Sant Pau d'Ordal; Ĝirona Espero, Apartat, 509 17080 Girona, Hispana Esperanto - Fervojista Asocio ĉe Stacidomo Sants Barcelona; Secció d'Esperanto Centre d'Estudis Comarcals d'Igualada, Baixada de Sant Nicolau, 21 08700 Igualada.

Dipòsit Legal : B-2736. 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. tel 725.5091 Sabadell.

PREMIO "PETRO NUEZ"

ĝis 30.4.89 238.000
Pere Julià 5.000

FONDAĴO "MONUMENTO SABADELL"

ĝis 30.4.89 10.500
Pere Julià 15.000

FONDAĴO "KOMPUTILO"

ĝis 30.4.89 1.700
Pere Julià 5.000

Barakti kontraŭ la malfacilaĵoj pro manko de mono estas terure, sed insisti pri peto de helpo estas al ni iom malagrabla. Se vi opinias ke niaj fondaĵoj meritas apogon, volonte reagu.

FARIĜI SUBTENANTA MEMBRO, kies nuna jarkotizo estas 3.200 p-toj estas facila solvo por apogi la tutan agadon de nia Asocio.

KOTIZOJ 1989

Kiel promesite en nia antaŭa revuo ni atentigas niajn membrojn ke la venontan revuon ni sendos remburse al tiuj kiuj ne pagis sian kotizon ĝis la 30a de junio. Tio kaŭzos egan laboron al ni, kaj sendoelspezojn al vi. NEPREVITU TION kaj tuju pagu vian kotizon, sed prefere rajtigu nin enspezi ĝin trabanke. Telefonu al nia sekretariejo, kie ni deĵoras ĉiutage, ekde lundo al vendredo, inter 20a ĝis 22a h.

KOMARKAJ DELEGITOJ

Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf : Joan Inglada i Roig
St. Magí 20 - 3r. tel. (93) 893.7176 - 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf)

Garrotxa, Ripollès : Joan Torres i Nalda. Escola Llar. Ctra. de la Canya, s/n. tel. (972) 263829 - 17800 OLOT (Garrotxa)

Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La Selva : Ĝirona Espero, Apartat, 509 - 17080 Girona (Gironès)

Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp : Josep Ma. Serrano, Edifici Europa B-2-1 (St. Pere i St. Pau) tel. (977) 218941 - 43007 Tarragona (Tarragonès)

Baix Ebre, Montsià : Josep Ma. Altadill - Berenguer IV, 23 tel. (973) 442009 - 43500 Tortosa (Baix Ebre)

Illes Balears : Xavier Margais i Basi, Orient, 60 - tel. (971) 613830 07110 Bunyola (Mallorca)

Catalunya Nord : Joan Fernández, 21 rue Henri Matisse - F 66000 Perpinyà (Rosselló)

KONGRESA INFORMILO

Kiel promesite jen informado pri nia ĉi-jara Kongreso organizata de nia Asocio, de la Grupo de Esperanto de Perpinyà kaj de la universitata Centro de Esploroj kaj Studoj Katalunaj, ene de la socilingvistika departemento. Jen kvalita diferenco!

Aldoniĝas la aliĝilo kiu unuavide similas al la antaŭaj, almenaŭ laŭ la formato kaj distribuo de la teksto sed tamen troviĝas en ĝi ankaŭ kelkaj diferencoj.

Unue rigardu la kotiztabelon kaj vi trovos ege malaltajn kotizojn por la junularo kaj akompanantoj de la KEA-membroj, kio pruvas nian intereson faciligi ĉies ĉeeston. Jen alia kvalita diferenco!

Tuj rigardu la loĝadan proponatan sistemon, ĉar ĝi renversas la tradician kongresan kutimon. Ĝi forigos la kutiman nervostreĉon kaj tempoperdan translokiĝon inter la hotelo kaj la Kongresejo. Kia ĝuo kaj feliĉo promenadi tra la universitata ĝardeno kaj daŭre troviĝi en samideana etoso! Jen nova kvalita diferenco!

Nepre atentu pri nia universitata kunorganizanto kiu aktive engaĝiĝis. Jen definitiva kvalita diferenco!

Nia Asocio invitis plurajn elstarajn esperantistojn al kunlaboro kaj ĝis nun ni jam ricevis la jesan respondon de la universitataj profesoroj Claude Piron el Svislando kaj Pierre Janton el Francio.

La programo kiel kutime estas provizora kaj en nia venonta junia revuo ni malkovros al vi ankoraŭ agrablajn novaĵojn. Fakaj kolektivoj estas invitataj kunveni dumkongrese kaj se ili informas nin, tre volonte ni aperigos iliajn informojn en la junia revuo. Ni klopodas aranĝi eksterordinaran Kongreson, sed nur multnombra kongresaro povas ĝin sukcesigi. Ne hezitu kaj tuj aliĝu al la 24a Kataluna Kongreso de Esperanto!.



KVINA INTERGRUPA RENKONTIĜO

IGUALADA

sabaton la 3an de junio 1989

Posttagmeze je la 16a h. junulara kunveno ĉe "Servei Comarcal de Joventut" Plaça St. Miquel s/n (1)

dimanĉon la 4an de junio ĉe la sidejo de "Centre d'Estudis Comarcals d'Igualada" Baixada de St. Nicolau, 21 (2)

je la 10a h.

Projekcio de pola 60-minuta vidbendo "Esperanto tra la mondo".

je la 11a h.

Kultura vizito de la urbo.


Kunveno pri instruado (Zagreba Metodo kaj aliaj perfektigaj metodoj)

je la 14a h.

Komuna tagmanĝo

je la 16a h.

Generala debato pri la temo : Kiel aktivigi la novajn esperantistojn?



KIE KONGRESI?


74-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO

Brighton
Anglujo
29 julio –
5 aŭgusto
1989



KONGRESO

49^a HISPANA



DE ESPERANTO

17^a 22^a JULIO 1989


BILBAO

45a

Internacia Junulara Kongreso

16 - 23 julio 1989

Kerkrade - Nederlando



t r a n s p o r t o


B.E.M.I.

74-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO

Biciklado por ESPERANTO 1989



Adresoj:
Marionne Lund, Prestvannet stud.heim A-122, N-9000 TROMSØ
Helle Eble Jacobsen, Langkaervej 24, DK - 2720 VANLØSE
Jean-Marc Verger, Lavilletterre, F - 60240 Chaumont-en-vexin



Urboj kaj datoj

ZARAGOZA - KERKRADE

(4/6 - 16/7)

- 4 Jun: Zaragoza (E)
- 5 " : ...libera...
- 6 " : Pamplona
- 7 " : Alsasua
- 8 " : Vitoria
- 9 " : ...libera...
- 10 " : ...libera...
- 11 " : San Sebastian
- 12 " : ...libera...
- 13 " : Mont-de-Marsan (F)
- 14 " : ...libera...
- 15 " : Bordeaux
- 16 " : Ste foy-la-grande
- 17 Jun: ...libera...
- 18 " : Saintes
- 19 " : La Rochelle
- 20 " : La Roche-sur-Yon
- 21 " : Nantes
- 22 " : ...libera...

- 23 " : Vannes
- 24 " : Hennebont
- 25 " : ...libera
- 26 " : Brest
- 27 " : ...libera...
- 28 " : Perros-Guirec
- 29 " : Paimpol
- 30 Jun: St Cast
- 1 Jul: ...libera...
- 2 " : Vire
- 3 " : ...libera...
- 4 " : Le Havre
- 5 " : Rouen
- 6 " : ...libera...
- 7 " : Amiens
- 8 " : ...libera...
- 9 " : Valenciennes
- 10 " : Charleroi (B)
- 11 " : ...libera...
- 12 " : Liège
- 13 " : ...libera...
- 14 " : Bonn (D)
- 15 " : Eschweiler
- 16 Jul: Kerkrade (NL)

KUNLABORAĴOJ

KIEL DEĈIFRI PSEŬDONIMOJN DE ESPERANTISTOJ - Bernard Golden .

Malnova kutimo

Dum la tuta historio de Esperanto troviĝas homoj, kiuj preferas kaŝi sian identecon, precipe rilate publikigon de verkoj. La unua esperantisto, kiu uzis pseŭdonimojn - plurajn! - estis d-ro Zamenhof mem. Hodiaŭ la kutimo estas same populara kiel antaŭ unu jarcento. La uzanto de pseŭdonimo faras specon de ludo kun legantoj: "Divenu, kiu mi estas, se vi povas!" Kelkaj nomoj estas deĉifreblaj post iom da cerbumado; aliaj restas kriptaj, ĝis oni akiras la ŝlosilon aŭ ricevas helpon de alia fonto. Mi ilustras la problemojn de malĉifrado per priskribo de la plej oftaj rimedoj uzataj de aŭtoroj por kaŝi sian identecon.

Anagramoj

Tiu ĉi speco de kaŝnomo estas la plej facile deĉifrebla, ĉar ĉiuj informoj pri la vera nomo troviĝas en la ĉifrita versio. Oni devas nur rearanĝi la literojn. Estas du variaĵoj. La unua estas simple inversa skribo de la ĝusta nomo; oni, do, legu ĝin komencante de la lasta litero. Ekzemplo estas Trac, kiu ne tro efike kaŝas la familian nomon de Théophile Cart, franca aktivulo de la fruaj jaroj de la 20-a jc. La pseŭdonimo L. Rereips estas traktebla sammaniere. La rezulto de retrolégado estas Spierer L., hungara esperantisto, kiu okupiĝis pri tradukado de beletraj verkoj. La inicialo L. estas la komenca litero de lia individua nomo László, kies ekvivalento en Esperanto estas Ladislao. En la dua speco de anagramo, la literoj estas libere intermiksitaj, kaj la rezulto kelkfoje aspektas tute nature kiel vera nomo. Tia pseŭdonimo estas Bernard Thaillet, malantaŭ kiu kaŝas sin Albert Lienhardt, franca esperantisto. En aliaj ekzemploj ne ĉiuj literoj de la kaŝnomo respondas al tiuj en la vera nomo, sed ĉiuokaze estas eble spuri la homon. La literoj de la sekva pseŭdo-hebrea nomo Arieh Ben Guni post rearanĝo donas "arenghien" plus "b", "i" kaj "u". Estas evidente, ke ni havas aferon tie ĉi kun la nomo Warengchien. Alex Kay ŝajnas angla nomo, sed post ŝanĝo de la vicordo de la literoj unu el la rezultoj estas Kalexay. Estas eble anstataŭigi "x" per "ks" kaj "k" per "c", ĉar tiu ĉi litero en kelkaj lingvoj havas la sonon de "k".

La parte deĉifrita nomo nun aspektas kiel Kalecsay, kaj post substituo de "o" al "e" ni atingas la solvon: Kalocsay.

Tradukoj

Pli malfacile analizeblaj estas pseŭdonimoj bazitaj sur tradukado, ĉar ne estas eble scii, el kiu lingvo la nomo estis tradukita en Esperanton. Oni devas provi diversajn eblojn. La nomo Grenkamp konsistas el du Esperantaj morfejoj, "gren-" kaj "kamp-". Traduko en la germanan lingvon donas senĉavan nomon, Kornfeld. Salo Kornfeld estis pola esperantisto, kiu loĝis en Parizo kaj estas konata kiel kunredaktoro de Plena Vortaro. La plumnomo Glacimonto donas pli da komplikaĵoj. La angla traduko, iceberg, ne estas familia nomo, kaj ne estas konata germana esperantisto portanta la nomon Eisberg. Tamen, la sama germana vorto aperas en la rusa lingvo kun la formo aisberg. Jen la solvo! Eugène Aisberg estis rusa esperantisto, kiu laboris en Parizo kaj fariĝis fakulo pri la radio kaj televido. Povas okazi, ke la originala nomo ne estas tradukita en Esperanton sed en alian etnolingvon. Tiu eĉ pli malfaciligas la deĉifradon, kaj verŝajne nur poligloto havas eblon solvi la enigmon. Ekzemple, oni devas scii, ke en la nomo Teo Melas, melas estas helena vorto signifanta "nigra". Ankaŭ la sekva paŝo bezonas lingvoscion por trovi la ĝustan etnolingvon, ĉar la adjektivo "nigra" estas uzata kiel familia nomo en pluraj lingvoj: angla Black, hungara Fekete kaj germana Schwarz. Tiu ĉi nomo ja estas konata en Esperantujo: Raymond estis franco kaj Teodoro estis hungaro. La individua nomo de la pseŭdonimo estas decidiga, ĉar Teo estas la unua duono de Teodoro. Teo Melas, do, estas Teodoro Schwarz, la fama meceno kaj kunfondinto de la revuo Literatura Mondo.

Vortludoj

Tiu ĉi speco de pseŭdonimo estas vera ludo - vortludo ĉar la nomo kaŝiĝas malantaŭ ordinaraĵoj en Esperanto. En hungarlandaj publikigaĵoj troviĝas de tempo al tempo artikoloj subskribitaj per la vorto "aspra" (prezentanta krude raspecan supraĵon). Prononcante la vor-

ton, oni povas facile elvoki la familian nomon de Ottó Haszpra (elp. 'haspra'). En alia lando estis esperantisto, kiu aperigis ĉe la fino de kelkaj el siaj verkoj la plumnomon Mara Inko. Kunmetante la du vortojn post forigo de la litero "a" ĉe la fino de "mara", oni povas facile rekoni la individuan nomon Marinko. La plej bone konata esperantisto kun tiu nomo estis Marinko Gjivoje (Ĝivoje) el Jugoslavio.

La solvo de la enigma nomo Cristiano Agarido bezonas iom da scio pri la Biblio. Agarido estas analizebla kiel kunmetaĵo de Agar + ido. Agar (aŭ Hagar) estas egipta sklavino, kiu rolas en la 16-a ĉapitro de la malnovtestamenta libro Genezo. Kiu, do, estas ŝia ido? En Gen 16:15 estas dirite, ke "Abram donis al sia filo, kiun naskis Hagar, la nomon Iŝmael". La sekva paŝo estas trovi esperantiston portantan la maloftan nomon Iŝmael. Li estis la fama pioniro de la brazila Esperanto-movado, Iŝmael Gomes Braga.

Akronimoj, sigloj kaj inicialoj

Multe pli malfacile deĉifreblaj estas pseŭdonimoj kaj kaŝnomoj, konsistantaj el inicialoj, literonomoj aŭ vorto kunmetita per elementoj de la vera nomo. Tiu ĉi speco nomiĝas akronimo. La esperantisto, kiu uzis la akronimon Hobomo evidente havis tripartan nomon, kies inicialoj estas H.B.M. Kiu konas la historion de la Esperanto-movado, precipe en Britio, facile identigos la enigmulon - Harold Bolingbroke Mudie. Li estis angla borsisto, kiu helpis organizi la trian Universalan Kongreson.

Kelkfoje la kaŝnomulo uzas ne la Esperantajn nomojn de la literoj sed tiujn en alia lingvo. Akronimo formita tiumaniere estas E.Ĉefeĉ, la elpensinto de la propagandaj "ŝlosiloj" de Esperanto. Li estis germandevena kemiisto, kiu loĝis en Anglio, do oni provu trovi la inicialojn de lia nomo jen laŭ la germana prononco jen laŭ la angla prononco de la literoj de la alfabeto. La angla alfabeto estas la ŝlosilo por deĉifri tiun ĉi akronimon; "eĉ" estas tre proksima al la prononco de la litero "h" (ache aŭ aitch = 'ejĉ') kaj "ef" estas la angla litero "f". La persono, kiun ni serĉas kun la nom-inicialoj H.F.H. estas Herbert F. Höveler.


Aliasoj

Mi nomas aliaso (latine alias) nomon, kiun oni alprenas por diversaj kialoj. En tiu

ĉi kategorio la nomoj ne diferencas disde ordinaraĵoj, t.e. ne okazas anagrama aliviciĝo de literoj, kaj malestas ĉiuj elementoj de vortludado kaj akronima ŝtrumpigo. La aliaso estas simple kroma nomo. Kelkfoje ĝi fariĝas oficiala anstataŭigo de la unua familia nomo. En la sekcio pri anagramoj troviĝas la pseŭdonimo L.Rereips de László Spierer. Post la milito, li ŝanĝis sian familian nomon al Somlai. Jen komplikaĵo por bibliotekistoj kaj bibliografiistoj. La unua eldono de la hungara romano La knaboj de Paŭlo-Strato (1937) estis tradukita en Esperanton de Ladislao Spierer, sed la tradukinto de la dua eldono, (fotorepreso, 1978) estis Ladislao Somlai!

Dum pluraj jaroj oni ne suspektis, ke Julian Modest estas aliaso. Ĉar liaj publikigitaj noveloj plej frue aperis en hungaraj periodaĵoj, iuj eĉ opiniis lin hungaro. Poste kelkaj noveloj estis denove publikigitaj en alilandaj periodaĵoj, sed la aŭtoro estis Georgi Miĥalkov, kiu estas bulgara nomo. Jen problemo: kiu estas la vera nomo kaj kiu la aliaso? Post pli da detektiv-laboro, la sekreto estis rivelita; Georgi Miĥalkov estis bulgaro loĝanta en Budapeŝto, kie li komencis uzi la aliason Julian Modest.

Novembro 1988



DEZIRAS
KORESPONDI

29-jara fervojisto kaj interŝanĝi fotojn kaj librojn pri lokomotivoj. Tomáš Studnička-Sladovnická, 10 CS-440 01 LOUNY (Ĉeĥoslovakio)

PAUL TOURON, 3 R. de Combret F-30000 NIMES (Francio) interesiĝas pri programoj por komputiloj Commodore 64 aŭ Atari 1040.



je la servo de Esperanto-kulturo

La simbolo de la kooperativo Literatura Foiro bildigas ĉelojn, strukturon kaj labormetodon de ĉiu institucio, fondita en Svislando la 30an de majo 1980. La kvin petaloj paŭsas skemon de la kvinpinta stelo de Esperanto, same verdkolora: ĉar LF-koop ĉelas ĝuste la produktadon kaj distribuadon de kulturaj varoj kaj servoj en Esperanto, sur la kvin kontinentoj de la mondo. Sed la petaloj ne estas kontinua bildo: ili konverĝas al komuna kerno, tamen konservante sian individuecon, laŭ la koopera spirito. Tiun individuecon emfazas la kompleta verdeco de unu petalo, dum la ceteraj estas nur konturitaj.

Se oni bone observas la petalojn mem, oni rimarkas ke ili similas al homaj kapoj, desupre viditaj: kio substrekas la humanisman karakteron de nia kultura politiko. Ili estas kvin: ne nur kiom la mondogoj en la fama poemo de Grabowski, sed ankaŭ kiom la sidejoj de LF-koop en la momento de ĝia fondo (Svislando, Italio, Francio, Finnlando, Svedio), kaj krom la fakoj disvolvantaj la produktadon de la kooperativo.

La Gazetfako eldonas periodaĵojn, kun internacia aŭ regiona karaktero: la unuaj, kiel Literatura Foiro, strebas kontribui al la kresko de Esperanto kiel transnacia kulturlingvo; la duaj, kiel Lingua Verde, etnolingve informas la koncernan publikon pri la kulturaj atingoj de Esperanto.

La Librofako presas neperiodaĵojn: librojn, sed ankaŭ bildkartojn, kalendarojn ktp en Esperanto. Famaj estas la volumoj de la serio Mondliteraturo: per la traduko de Kalocsay, Infero de Dante Alighieri; per la traduko de Leppäkoski, Kalevala kompilita de Elias Lönnrot.

La Bendofako pruvas la avangardecon de LF-koop en tiu ĉi kampo: Oliver Tzaut, Gianfranco Molle, Johán Valano, Amplifiki aperis disko- aŭ bendoforme, ĉiam altkvalite, danke al la produkta strebo de la kooperativo. Unika servo plie estas Esperanta Songazeto, kiu atingis nun la kvinan numeron kaj daŭre aperos. Kio estas precize kaj kion ĉelas Esperanta Songazeto? Ne temas pri legado de jam ekzistantaj gazetoj, sed pri tute originala produkto, kiu anstataŭ aperi presforme estas registrita kaj „empaĝigita” en studio de profesiuloj, surbaze de memstara redakta plano. Ĝia enhavo estas plej varia: intervjuoj al famuloj en Esperantio, teatraĵoj, muzikaj novaĵoj, raraj sondokumentoj, kiuj riskas malaperi aŭ ĉiukaze estas preskaŭ neatingeblaj por averaĝa esperantisto. Do, revuo, kiun oni



povas reaŭskulti, por lerni kaj ĝui samtempe agrablajn voĉojn kaj bonan muzikon. Destinata al ĉiuj, Esperanta Songazeto taŭgas aparte por blinduloj, por izolitaj esperantistoj, por perfektigaj kursoj, sed povas ankaŭ brile variigi la programon de klubaj vesperoj, ĉu amuze per la teatra kaj muzikaj partoj, ĉu informe, ĉu diskutveke. Minora, se ne malpli efika estas la rolo de la Konkursfako: premioj kiel La Verko de la Jaro aŭ kiel Clelia Conterno kontribuis al la reliefigo kaj eĉ malkovro de novaj talentoj en nia literaturo.

Fine la Staĝofako, kun siaj ambiciaj planoj kaj valoraj atingoj: diversaj Esperanto-Rendevuoj (ERoj) en Italio, Svislando, Katalunio, Finnlando, Germanio, kun paralelaj studgrupoj dum semajnfinoj; la Mediteranea Konferenco de Esperantologio, okazinta jam en Hispanio kaj en Italio, ne nur por scienculoj sed por ĉiu esperantisto, kiu volas profundigi lingvajn demandojn; la Internacia Literatura Forumo, altnivela kultura kongreseto okazanta preskaŭ ĉiujare (en 1986 en Budapeŝto); kaj la plej grava, la internacia staĝejo en Bouresse (apud Poitiers, Francujo); La Kvinpetalo.

La Kvinpetalo estas la palpebla domo de LF-koop. Societo Yvonne Martinot (nomo de la forpasinta dojeno kaj mecenato de LF-koop) mastrumas kelkajn etajn konstruaĵojn en vilaĝeto apud Puatiero: ili estos kvin, laŭ la fina plano. Societo Yvonne Martinot — kiu estas kolektiva membro de LF-koop, same kiel la itala Interlingvistika Centro kaj Kataluna Esperanto-Asocio — prizorgas, laŭ mandato de la kooperativo, la organizon de someraj staĝoj, cele al formado de kadroj por la Esperanta komunumo: ĵurnalistoj, recenzistoj, instruistoj, respondeculoj pri publikaj rilatoj ktp. La Kvinpetalo estis oficiale inaŭgurita de Gaston Waringhien la 3an de majo 1987, sed staĝoj okazis jam en antaŭaj jaroj.

La multiĝo de kolektivaj membroj kaŭzas la multigon de servoj, kiuj kupliĝas al tiuj propraj al LF-koop: ekzemple Esperantologiaj bibliotekoj, en Francio kaj Italio, laŭ la modelo de CDELI en Svislando.

Sub la gvido de Giorgio Silfer, kun la strikta kunlaboro de Suzanne Bourot, David Buhlmann, Tazio Carlevaro, Irma Heikkilä, Perla Martinelli, Marco Picasso kaj dekoj da kooperantoj dise tra la mondo, malgraŭ konstanta premo pro apenaŭ sufiĉa laborforto kaj pro minimuma kapitalo, la kooperativo de Literatura Foiro progresadas: ĝia ekspansio kaj prestiĝo estas mezureblaj per la nombro da varoj kaj servoj, per la vasta publiko, kiun ĝi atingas. Sed se la organizon modelis la kriterioj de produktado kaj rentumo, la strategion inspiras la profunda sentemo al la bezonoj kaj aspiroj de la esperantistaro, konsiderata kiel formiĝanta popolo, diaspora, intelekto aktiva, riĉa je spiritaj fermentoj. Tial LF-koop ne hezitas surmerkati siajn varojn eĉ kiam ne ekzistas profito, ekzemple en Hungario.

LF-koop laboras por konstrui ponton inter okcidento kaj oriento, por pli matura Esperantio, por kultura alternativo pere de Esperanto.

Giorgio Silfer

Giorgio Silfer



La feriejo GASTEJO EDMOND PRIVAT de Kultura Centro Esperantista (Chemin des Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds) estas dum la tuta jaro ideala hejmo por studemaj kaj promenemaj esperantistoj. Petu la informilon!

Daŭrigo de la kurs-programo de la INTERNACIA ALTLERNEJO de Kultura Centro Esperantista:

- 19-24 junio: Esperanto-staĝo
- 24-25 junio: Studa semajnfino.
- 3-8 julio: Esperanto-staĝo.
- 10-22 julio: 2-a Intensiva Pedagogia-Metodika Kurso organizita de UEA-ILEI kun KCE.
- 10-15 julio: Esperanto-staĝo.
- 17-22 julio: Paul Klee kaj Le Corbusier: Svisaj motoroj de la nuntempa arto.
- 17-22 julio: Esperanto-Feriado por infanoj kaj familioj.
- 17-22 julio: Esperanto-staĝo.

- 23-27 julio: Unua Seminario Internacia pri Lingvo-Didaktiko.
- 24-29 julio: Zamenhof kaj Privat, gvidantoj de nia movado.
- 24-29 julio: Esperanto-Feriado por infanoj kaj familioj.
- 24-29 julio: Esperanto-staĝo.
- 31 julio-5 aŭgusto: Esperanto-staĝo.
- 7-12 aŭgusto: Stilaj kaj verkaj ekzercoj kun Johán Valano.
- 7-12 aŭgusto: Esperanto-staĝo.
- 13-18 aŭgusto: 2-a Internacia Esperanto-Konferenco.
- 14-20 aŭgusto: 8-a Internacia Literatura Forumo.
- 14-19 aŭgusto: Esperanto-staĝo.
- 18 aŭgusto: franclingva Inaŭguro de Ekspozicio pri Edmond Privat en la Urba Biblioteko.
- 19-20 aŭgusto: Festo Edmond Privat kun esperantlingva inaŭguro de la ekspozicio.

KRUCVORTENIGMO N-RO 2 de Pere M. Martin i Burutxaga

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1							■			
2		■		■						
3					■					
4			■			■			■	
5								■		
6						■	■			
7		■								
8				■		■				■
9						■				
10						■				■

HORIZONTALALE:

1. Homo, kiu havas vian saman profesion (6). Prepozicio (3)
2. (inverse) Tio, kio faras ion pura (6)
3. Organizo, kiu zorgas pri malsanuloj, militkaptitoj, ktp (4,5)
4. Malgrand' (2). Du konsonantoj malsamaj (2). Nedifina pronomo (2)
5. Ŝajnas (7). Kondiĉa subjunkcio (2)
6. Rilate al projekto (5). Kontraŭreligia ag' (3)
7. Kapacito de ŝipo (8)
9. Monunu' (5). Prepozicio (4)
10. Antaŭnomo de fama itala deputitino (5). Du vokaloj egalaj (2). Verba finaĵo (1)

VERTIKALE:

1. Sendi kaj ricevi leterojn (10)
2. Oksigeno (1). Profit' (4). Numero (3)
3. Regul' (3). Parto de la tago (6)
4. Patrino de 1' patro (5). (inverse) Natrio (2)
5. (inverse) Argent' (2). El parto de Belgio (7)
7. Moviĝis de unu loko al alia (4). (inverse) Vidorgan' (4)
8. Kava loko (4). Ĉefo de familio (5)
9. Kataluna azeno (3). Aro da sinsekvantaj objektoj (5)
10. Loko, kie oni aĉetas kuracilojn (7). Pronomo (2)

KRUCVORTENIGMOJ

SOLVO de la n-ro 1 publikigita en nia revuo 259-decembro 1988, kies aŭtoron Pere M. Martin i Burutxaga, ni forĝesis mencii. Senkulpigu nin. Horizontale: 1-Klasĉambro 2-Nei. Al. 3-Art. Kreado. 4-BN. Ĥor. Pot. 5-IIO. 6-Luanto. 7-Doloro. 8-Junio. -9-Ru. Tio. 10-Objekto. Uj.

Vertikale: 1-Knabinoj. 2-Lerni. Urb. 3-Ait. olunuJ. 5-Ĉokolado. 6-RR. No. Bt. 7-Alta-8-AP. 00. 9-Radoj. Iu. 10-Olot. Bovoj.

La gajninto fariĝis HĖKTOR ALÒS el Kjustendil (Bulgario) GRATULON!

Partoprenu en nia dua enigmo kaj sendu viajn solvojn ĝis la 30a de junio 1989a.